

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Multaj leteroj kaj salutkartoj de fidelaj geaŭdantoj atendas respondon. Ni hodiaŭ malfermas nian leterujon kaj respondas al ili. Se vi estas inter la skribintoj, aŭskultu bone, kiam venos via nomo !

El Strasburgo (Francio) ni ricevis de fraŭlino Dietz poŝtkarton kun bildo de la Telstar-satelito kaj afabla vorteto : « *Plej koran dankon pro via ŝatata programo. Lastatempe mi bone kaptis viajn ĉiam interesajn disaŭdigojn, pro kiuj mi multe dankas.* » Sekvas detaloj pri la plej favoraj horoj por aŭdado. Dankon pro tiuj kuraĝiga saluto kaj utilaj teknikaj informoj.

El Walsrode (Germanio okcidenta) venis bondeziroj de sinjoro Hermann Behrmann: « *Vi certe ricevis bondezirojn el la tuta mondo, do bonvolu ankaŭ akcepti la miajn... Mi jam aŭskultis Edmond Privat kaj poste sinjoron Ecabert, kaj nun vin. Al via nefacila kaj tradici-riĉa laboro mi deziras ĉion bonan kaj multajn sukcesojn.* » Tiuj diroj pravas, ke ni ne parolas al neniuj, kiel kelkfoje ni havas la impreson, kiam ni staras antaŭ la radio-mikrofonoj. Dankon !

El Halle (Germanio orienta) ankaŭ venis saluto de Ernst Muthschall, kiun ni ankaŭ dankas.

El Anglujo venis du poŝtkartoj. Gesinjoroj Brownlee el Hexham diras sian interesiĝon pri nia rakonto koncerne la helpon de la svisa kooperativa movado al Dahomeo. Sinjoro C. M. Cather el Torquay estis tre kontenta konstati, ke malgraŭ la morto de doktoro Edmond Privat ni daŭre parolas pri mondfederalismo. Ni estas kontentaj scii, ke aŭdantoj atendas informojn rilate tiun temon. Kiam mi parolos pri mondfederalismo, mi havos antaŭ miaj okuloj nian britan samideanon.

El Biel (Svislando) venas saluto de Hans Grossmann, kiu aŭskultis la elsendojn pri Ruĝa Kruco. Li partoprenis parton de la vojaĝo tra Afriko kun la Karavano de Amikeco. Li baldaŭ reafrikanos, kiel li diras, ĉi foje al Kongio. Se Hans Grossmann havas ankoraŭ tempon aŭskulti niajn elsendojn dum siaj vojaĝpretigoj, li aŭdos kun certa intereso niajn venontajn prelegojn, kiuj raportos pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando.

El la sama urbo Biel mi ricevis gratulojn de Marcel Erbetta, fame konata en Esperantujo kiel estro de la interlerneja korespondado Grajnoj en Vento. Lin interesegis la geknabaj rakontoj pri la vilaĝo La Sagne. Multaj geaŭdantoj samopiniis. Iliaj salutkartoj nin kuraĝigas rekomenci similajn prelegojn pri svisa regiona vivo kun la helpo de la esperanto-gelernantoj de la vilaĝo La Sagne. Sinjoro C. M. Cather el Torquay (Anglujo) en dua poŝtkarto petas la plenumon de la promeso : tio estas sendo de bildo de La Sagne. Kun ĝojo ni plenumas nian promeson al ĉiuj, kiuj esprimis sian ĝojon aŭdi geknabajn voĉojn priskribi sian vivon.

El Romford (Anglujo) ni ricevis la gratulojn de C. Veness, kiu aŭskultas regule ĉiusemajne nian programon.

El Glinde apud Hamburgo (Germanio okcidenta) venis interesa poŝtkarto de sinjoro Bruno Gahlec, kies kelkajn dirojn mi legas al vi : « *Mi havis la feliĉon, ke mi sukcesis bone aŭskulti vian paroladon pri via vilaĝo kaj la tiea esperanta vivo. Jes, vi pravas, ne ĉiam grandaj urboj donas ekzemplon. Ekzemple Glinde jam depost 10 jaroj havas Esperanto-vojon kaj Hamburgo nur poste prenis tiun ekzemplon por nomi en nova kvartalo ankaŭ Zamenhof-straton... Mi havis la okazon citi vian paroladon pri viaj lernantoj en Bremen al lerneja inspektoro.* »

El Germanio venis ankoraŭ du gratulvortoj, tiuj de sinjoroj Oskar Breddermann el Esslingen kaj Bruno Siegert el Fürth apud Bay. Tiu lasta diras : « *Jam depost longa tempo mi partoprenas kiel gasto viajn laborojn en Esperantujo ! Mi ĝojas pri la bonaj interesaj 10 minutoj, kiuj alvenas tra la aero al ĉiuj aŭskultantoj en la mondo.* »

El Clermont-Ferrand (Francio) ni ricevis longan leteron kun bildoj pri la aŭvernaj folkloraj dancoj kaj allogaj perspektivoj pri la Muelejoj de la Meti-lernantoj kaj ekskursoj en la aŭvernaj montaroj. La aŭtoro de la letero, sinjoro Gaston Vidal, sendas tiujn dokumentojn al la junaj radio-prelegistoj. Li « *envias tiujn gejunulojn, kiuj havas la grandan ŝancon vivi en tiu bela montara vilaĝo kaj invitas ilin en Clermont-Ferrand.* » Ni trandonos al ili tiun allogan inviton. El la sama urbo venis ankoraŭ alia gratulo de fraŭlino Hueter.

La plej longa letero venis el Most (Ĉeĥoslovakio). En ĝi sinjoro Jiri Patera donas interesajn informojn pri esperanto en sia regiono kaj ĝia instruado. Mi legas al vi parton de tiu letero : « *En Ĉeĥoslovakio ne ekzistas esperanto-organizaĵo kaj la unuopaj kluboj aŭ grupoj laboras kiel interes-rondoj de klerigaj institucioj aŭ laboristaj uzinaj kluboj.* » En Most, kie vivas sinjoro Patera, dum pli ol tri jaroj la esperanto-klubo ne funkciis, kaj li diras : « *Sekve kun du aliaj samideanoj mi fondis novan grupon, kiu apartenas al loka kleriga domo. La direktoro de la kleriga domo mem eklernis la lingvon antaŭ jaroj. Nia rondeto havas nun ses membrojn.* » Poste sinjoroj Patera rakontas ankoraŭ, kiel li instruas nian lingvon, siajn sukcesojn kaj malsukcesojn.

Kun tiu letero mia leterujo malpleniĝis. Ĝi do atendas la salutojn, rakontojn aŭ eĉ informpetojn de niaj aŭskultantoj.

Sur mia geografia mapo iom post iom troviĝas flagetoj. Ili reprezentas miajn aŭskultantojn, do vin ĉiujn, kiuj regule kaptas la svisajn kurtondojn kaj tion diras. Ili estas bildo de nia esperanta mondo kaj konstante rememorigas al mi, ke dise tra tuta Eŭropo, malgraŭ la diverseco de la kulturoj, kutimoj, lingvoj, rasoj kaj religioj, naskiĝas trankvile nova Eŭropo, kiu superregis siajn internajn konfliktojn. Tiu Eŭropo formiĝas en niaj koroj kaj cerboj. Neniu limo aŭ kurteno nin disigas. La flagetoj pikiĝas norde kiel sude, oriente kiel okcidente. La ondoj de la radio ne haltas ĉe artefaritaj limoj. Ni mem ne ĉesigu nian amon ĉe limoj. Kaj kiam ni volos serĉi limojn al nia kontinento, ni rimarkos, ke ili ne ekzistas. Nia lingvo, kiu naskiĝis en Eŭropo, jam delonge fariĝis tutplaneda. Tiel ankaŭ fariĝas nia penso. Ni meditu tion, dum ni eble ferie frekventas plej diversajn popolojn. Kial tiuj popoloj restas al ni fremdaj ? Ĉar artefaritaj limoj ilin disigas. Kontakto kelkajn samideanojn inter ili. Vi havos la impreson subite esti ĉe vi, kun delonge konata amiko. Lingvo vin ligas plej nature. Kaj ekzistas ankoraŭ homoj, kiuj kuraĝas diri de tiu lingvo, ke ĝi estas artefarita. Ilia koncepto de la mondo estas artefarita, ĉar ĝi ne konformiĝas al la veraj faktoj.

Vi aŭdis elsendon de Radio-Svislando.

Karaj geaŭdantoj, Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo je la venonta semajno !

-oOo-